GISTO, Set/2003
G.Otto Vaske
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
otto@caiweb.com.br
Senpaga legajxo ttt-sendebla.

AKUZATIVA MISUZO

Jen, infre, analiza teksto kun la celo helpi enkapigi la gxustan uzon de akuzativo. Interkrampe aperas algarismoj kiuj identigas la gramatikan funkcion de la vorto, sciate ke chiu frazo nepre enhavas subjekton, verbon kaj objekton, lau la sekva tabelo:

(1) = verbo transitiva (postulas akuzativon).
(2) = Rekta objekto (povas esti 2 au 3 vortoj).
(3) = Verbo NE-transitiva (do NE postulas akuzativon.
(4) = Subjekto (kiu/kio uzas la verbon. Foje kasxita!)
(5) = Prepozicio – Memoru: foje akuzativo "englutas"gxin = (en) La venontaN monatlastaN sabatoN okazos nia Verda Kafo – Atentu al statosxangxo: krom la cheesto de prepozicio (en au sur) staru la akuzativa-N – Ekz.: traduki NE-esperantan tekston EN esperantoN, t.e. esperantigi nacilingvan tekston.

Analiza teksto.

Chiuj gelegantoj(4) scias(1) distingi(1) la tempojn(2) de(5) la verboj kaj scias(1) identigi(1) la chefajn prepoziciojn(2). Estas(3) necese observi(1) chu verbo(4) estas(3) ne-transitiva au chu gxi estas(3) transitiva.

Per(5) chi pokaj detaloj la valoraj kaj parolemaj kuragxuloj(4) konsiderinde altigos(1) la kapablon(2) ne plu erare uzi(1) akuzativon(2).

MEMORU(1): verbo(4) kun(5) aldonita sufikso-IG (promeni/promenIGi) chiam farigxas transitiva verbo, postulas(1) rektan objekton(2) do, vorton(2) kiu evidente montrigxos per(5) la finajxo-N. Memoru ankau ke, post(5) verbo kun(5) sufikso-IGX neniam sekvas(1) akuzativa-N(4).

Ni(4) ne forgesu(1) ke, neglekte paroli/skribi(1) estas(3) acha vizitkarto kiu(4) ege malfavoras(1) la gauchan E-movadon(2) dum la preparlaboroj de(5) la LKK. Ni(4) forjxetu(1) la fieron(2), klinu(1) la kapon(2) kaj rapide konkeru(1) chi pokajn suprajn erojn(2) kiuj(4) troe okulfrapas(1). Se ceterajn gramatikajxojn(2) oni(4) iom neglektas(1), espereble gravaj kaj kleraj vizitantoj(4) pardonos(1) nin(2).

ESPERANTO EN KINEJO

Ja, vere okazis ke jxurnalo en Porto Alegre anoncis la prezentadon de filmo parolata tute en Esperanto. Domagxe la anonco aperis samtage kaj eble pokaj gesamideanoj legis kaj/au havis sxancon spekti la filmon. Lau la anonco gxi titoligxis INCUBUS, 76 minutojn longa, lau DVD. Por mi estis maleble veturi al la chefurbo. Mi tre esperas ke dum la Verda Kafo iu spektinto diros al ni sian opinion pri la enhavo kaj pri la uzado de la internacia lingvo, chu neutrale au chu oni mise traktas Esperanton.

RESTU ĈIAM SBELTA.

Se via chirkauventra zono superas 95cm via koro, la povrulo kiu neniam rajtas ripozi, jam suferas aldonan laboron. Cetere via figuro montras ke vi ne sufiche zorgas pri via sano. Memoru ke, ni ankorau ne devas timi trologxatecon pro esperantistoj, do oni plejzorgu pri nia bona digestado. Nutristoj instruas ke la digesto komencigxas en la busxo. Bona machado estigas kaj enmiksas salivon inter la nutrajxoj. Vi, bona observanto, jam rimarkis ke dum vi bierumas ne estigxas salivo tial, lau nutristoj, oni devas ne trinki dum tag- au vespermangxo. Tio inhibicias salivoformadon kaj malhelpas la efikan laboron de la stomako char gxi ne sukcesas oportune arigi la nutrajxojn en nutrobulon. Chi-bulon la stomako lante "konsumas" per la peristaltaj movoj. Trinki vi rajtas, jes, sed nur du horojn post la chefmangxoj. Ne timu tro sekan gorgxon. Memoru ke, se dum longa piedirado, revene de pikniko, malsato gxenas vin kaj ne restis guto da trinkajxo en ies botelo, ech sekegajn biskvitojn oni sukcesas mangxi tamen post longa machado. Jen do la celo de longa machado: liveri sufichan salivon al la digesta proceso. Cetere, akurata machado postulas malpli da nutrajxoj por same produktiva vivo. Gauchoj ne konsentas sed veras ke, mangxi viandon estas noca kutimo. Pli ol 400 mil gegauchoj mortas antautempe, jare, pro kormalsanoj. Kulpas la grasa churasko?...ne, kulpas la nebremsata avidemo grasigi lipharojn per grasa ripajxo. Pensas ili savigxi per la aserto, ke ili elektas nur sengrasajn viandopecojn. Kaj mi (advokato de la diablo?) rediras: bovinon magran oni ne buchas. Oni timas ke gxi estas tuberkuloza. Viva atestanto, ke viandon oni devas flanken lasi estas mi, kiu de pli ol 20 jaroj ne plu voras kadavrojn. Kompense mia hepato, antaue plendema, neniam plu "kverelas". Indas aldoni, ke la plej fortaj bestoj (elefanto,, rinocero, chevalo, hipopotamo k.a.) abomenas viandajxon. Nia organismo, ekde la dentoj, estas ece vegetarmangxa. Memorindas la epidemio "Freneza Bovino". Ofte oni legas pri gxia reapero Estu prudenta, restu sbelta!

ELLA RETO

Cherpita el la e-reto, mi kuragxas enmeti chi-mincajn anekdotojn manke de pli "bongustaj", kiujn mi atendas de vi sed, versxajne, ili devojigxas.

Pastro iras al prizono, kie estos ekzekutita krimulo. Plenumante sian devon la pastro diras: mi alportas por vi la trankviligan dian parolon... - Ne bezone, kara pastro. Post kelkaj minutoj mi audos Lin persone.

En internlanda urbeto okazis ke azeno mortis gxuste antau la pregxejo. Unu semajnon poste la besto restadas tie. La pastro, gxenata decidis iri al la urbestro, por plendi kaj peti ordonon, ke la kadavro estu tuj forigita. Ambau estis de malsamaj politikaj koloroj. La urbestro decidis piketi la pastron: Zorgi pri mortintoj, sinjoro parokestro, estas kutima tasko via.
- Jes, sinjoro, kaj sciigi la parencojn pri la morto estas ankau mia misio.

CHINA RADIO INTERNACIA

Raporto: - En la plej komforta horo por brazilanoj, 11,00Z = 08,00h matene, kun granda bedauro oni audas nulo-signalon, lau 7170 k 7150 Khc. Vespere, lau 9860 kaj 11700 Khc oni audas per tre variema signalo. Ofte okazas enmiksigxoj = QRM.